**Praha-ek-1955-29-01**

BULTENO DE ESPERANTISTA KLUBO ĈE OSVĚTOVÁ BESEDA EN PRAHA 2
---
No 29 S e p t e m b r o 1955 Aperas laŭbezone.
---

T u t ŝ t a t a k o n f e r e n c o de Esperantistoj-pacdefendantoj en Otrokovice 6.7. – 11.7.1955 kunvenigis pli ol 300 esperantistoj el preskaŭ 100 lokoj de nia tuta respubliko. Pluraj eksterlandaj geamikoj post jaroj denove ĉeestis niajn traktadojn. Kelkdekoj da salutleteroj kaj telegramoj venis el ĉiuj anguloj de la terglobo. Specialan ĝojon kaŭzis la salutoj de niaj sovetaj amikoj, precipe, tiu de s-ano Bokarev. Liaj instigaj vortoj multe helpis!

Nia klubo estis vere impone reprezentita. 41 membroj venis aŭ vagonare aŭ aŭtobuse. Programo de la konferenco estis en la pasinta numero de nia Bulteno kaj en ĉefaj trajtoj ĝi estis gvidilo al la aranĝantoj. Organize dank´ al samideanoj el Otrokovice la konferenco estis perfekte preparita kaj ni dubas ĉu iu pli bone kapablus solvi ĉiujn problemojn, kaj tiuj ne estis malmultaj. Do, bone pritaksanta ĉion ni povas nur danki al niaj amikoj en mezo de nia ŝtato, ke ili ebligis al ni pasigi tre agrablajn tagojn en Esperantujo.

Membroj de nia klubo kontribuis ne nur per sia ĉeesto, sed ankaŭ per sia programa aktiveco. Arta vespero de Verda Ĉaro de J. Baghy certe estis elstara kultura travivaĵo, s-ano Štěpán Urban montris fragmentojn el sia verkaro dum la literatura posttagmezo, s-ano Josef Vítek proksimigis en siaj vortoj kaj filmoj Skandinavion.

Honoro por nia klubo estis elekto en la funkcio de prezidanto de TKKE kaj s-ano Jaroslav Mařík prezidanto de la Junularo. Pluraj membroj de nia klubo estiĝis fakaj kunlaborantoj de TKKE.

Estas klare, ke en Otrokovice kuniĝis ĉiuj fortoj, eldonis komunan rezolucion, kiel gravan dokumenton. Ĝi estas gvidilo por nia porpaca laboro per Esperanto. Sukcesoj en Sovetio kaj en popoldemokratiaj landoj montras, ke Esperanto estas vere inda ilo por la tutmonda paco. Estas nun nia devo uzi ĉiujn niajn fortojn kontraŭ militpropagando kaj por forta tutmonda paco. Tiun vojon montris al ni Otrokovice.

\- - - - -

Aktualajn novaĵojn pri la movado en tutmondo legu sur la paĝoj de T K K E !

\- - -

La 25an de septembro 1955 aŭtobusa ekskurso al Karlovy Vary. Lastan dimanĉon de septembro dediĉas niaj klubanoj al vizito de tiu ĉi mondfama loko. Forveturo: Praha II., Charvátova 56/7 je la 5a matene, reveno je la 23a horo. Veturkosto: 28 Kčs. Aliĝojn akceptas: Anĉi Bárochová, pri la programo respondas Vuk Echtner. Limigita nombro de partoprenantoj. Renkonto kun lokaj gesamideanoj. Aliĝu tuj!

\-

**Praha-ek-1955-29-02**



ESPERANTISTA KLUBO en Praha kunvenadas ĉiumerkrede en Praha II., Ve Smečkách 26 je la 20a horo.
P r o g r a m o :

14. 9. Ota Ginz: La komencoj de Esperanta gazetaro.
21. 9. Dro Jaromír Jermář: Varsovia mondfestivalo kaj ĝia poresperanta sukceso
28. 9. Komuna ĉeesto de la prelego de Josef Vítek pri Finlando.
5. 10. Ĝ e n e r a l a k u n v e n o.
12.10. Jaroslav Mařík: Prelegserio „Resuma historio de Esperanto“
I. Historia skizo 1870-1955
19.10. Ota Ginz: La unuaj libro jen Esperanto.
26.10. M. Bendová: Porpaca laboro de esp.virinoj.

\- - - -

TUTJARAJ KURSOJ DE ESPERANTO
Osvětová beseda en Praha 2 aranĝas kursoj de Esperanto en tri kategorioj:
por infanoj de 8 jaroj
por komencantoj plenaĝaj
por progresaj esperantistoj.
Aliĝojn akceptas buŝe, skribe aŭ telefone Čestmír Stašek, Osvětová beseda v Praze 2, Štěpánská 61 – Lucerna – telefono 22 32 88.
Komenco de la kursoj post la 15a de septembro. Rekomendu al viaj amikoj!

\- -

POST 6 JARA PAŬZO NI REE HAVIS GASTOJN EL EKSTERLANDO. Al malnovaj membroj de nia Klubo ŝajnis, ke ili ree travivas iujn el entuziasmaj sincere amikaj vesperoj de sia Klubo, kiajn ili kutimis havi en la klubo dum ĉiu kunveno en la tempo inter la du militoj, kaj dum ne longa tempo post la dua milito. Nia junularo kaj la novaj adeptoj de nia lingvo travivis nur nun sian „Bapton Esperantan“. Ĉar nur nun ili povis elprovi siajn lingvosciojn pri esperanto vere praktike. Kun samideanoj el landoj fremdaj, kun samideanoj, kun kiuj ili ne povis interkompreniĝi per la lingvo ĉeĥa.
Antaŭ, dum kaj post la spartakiado, antaŭ kaj post la konferenco en Otrokovice ĉiam estis ankoraŭ gastoj eksterlandaj, kiuj donis al la kunvenoj de Esperantista Klubo en Praha karakteron de kunvenoj internaciaj, karakteron de malgrandaj kongresetoj.
Ni dankas kore al tiuj ŝatataj geamikoj el Aŭstrio, Francio, Danlando, Svedio kaj el Usono por iliaj vizitoj, per kiuj ili verŝis en niajn korojn novajn kvantojn da entuziasmo por la plej bela paca ideo, kiun konstruis nia Majstro. Koran dankon al ĉiuj, kiuj estante en Praha nur mallonge kaj ne havante eblecon viziti nian klubon, ke ili salutis nin almenaŭ pere de siaj prahaaj amikoj, aŭ per la vizito al la kluba prezidanto.
Nian inviton al Ĉeĥoslovakio, kiun ni siatempe publikigis en nia Bulteno kaj en eksterlandaj gazetoj sekvis intereso en 14 landoj. Ni tre bedaŭras, ke el plej multe de tiuj landoj ni neniun renkontis. Estis ankoraŭ esperantistoj el Anglio, Belgio, Bulgario, Danlando, Francio, Hungarlando, Jugoslavio, Nederlando, Pollando, Svedio kaj Norvegio.
Vi, karaj samideanoj, kiuj informis nin pri via intenco veni ĉi tien, ĉu vi bonvolus sciigi al ni kialon de via nealveno, se ne temis pri kialoj tute privataj? Ni estus al vi tre dankaj.

ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA

POR SEKURIGI PLUAN APERADON DE NIA BULTENO donacis bonkvalitan ciklostilan paperon samideanoj: Ambrož-Brno, Vítovec-Vodňany kaj Koral-Volyně. Mondonacojn sendis: Dr Ratay Praha 11,-, Ungrová Neratovice 26,-, Míčová Praha 6,-, Rybín Partyzánska Lupča 6,-, PhMr Jordán Ružomberok 6,-, Raška Klímkovice 20,-, M. el K. 32,-, Werner Brno 6,-, Filip Velíš 8,-, Fučková Valašské Klobouky 52,-, Kutík Pardubice 10,-, Bílý Praha 6,-, Štencová Jelenice 16,-, Werner Brno 16,-. Koran

dankon al ĉiuj! Aĉeton de pli granda kvanto de papero ebligis al ni s. M. el K. Ankaŭ al li ni direktas koran dankon!

La redakcio.

- - -

**Praha-ek-1955-29-03**



O T R O K O V I C E

Plej grava okazaĵo de komenciĝanta nia libertempo estis certe la tutŝtata konferenco en Otrokovice. Ni junaj atendis gravan programon, renkontiĝon kun fremdaj geesperantistoj simple ion eksterordinaraj. Tial granda parto de la karavano el Praha estis gejunuloj.

Sabata kaj dimanĉa programo kontentigis nin. Tamen ni konfesas, ke mi ne sciis respondi demandon de miaj gekolegoj: „Kie do estas tiuj 300 homoj?" Vere, la kunvenoj /antaŭtagmezaj kaj fakaj/ estis tre malmulte vizitataj. Al ni ŝajnis, ke multaj ges-anoj alveturis por komforte dormi en la hotelo!? Ni junaj atendis kun aparta intereso fakan junularan kunvenon. Ni esperis, ke ĝin partoprenos multaj malnovaj esperantistoj, kaj precipe fremdlandanoj, al kiu ni intencis montri gravan rolon de la junularo en ĉeĥoslovaka movado.

Niaj esperoj estos trompitaj. Laŭ ordono ni disponigis nur malgrandan ĉambron sen piano, kvankam ni anoncis kulturan programon. Konfuzo en la horindiko kaj fina ŝanĝo de kunsida ejo kaŭzis, ke unuan parton de nia kunveno, nome kulturan programon vizitis nur tre malmultaj homoj. Je la fino de l´ programo ni estis el la ĉambro simple elĵetitaj – alian vorton mi ne povas uzi! T i a l m a n i e r e r e a l i ĝ a s d o k u n l a b o r o kun la junularo? Ni ne parolu pri „izolemo de la junularo!

Malgraŭ tio nia kunveno estis vigla kaj decidoriĉa. Estis elektita nova tutŝtata komitato, estis solvataj kelkaj detalaj problemoj. Ni disiris kun ĝojo el bone farita laboro. La konferenco finiĝas, - ni forveturas kun miksitaj impresoj….

Van.

- -

Dua evento de la libertempo estis SET-1955.

Ĉijara SET /Somera Esperanto-Tendaro/ estis entrepreno grandformata. En tri 14tagaj etapoj partoprenis la tendaron ĉirkaŭ 140 geesperantistoj. Ankaŭ el nia Junularo partoprenis 8 membroj. Estis gvidataj tri kursoj B, C, D, el kiu la lasta devis „bapti" novajn geistruistojn! Kvankam ni studis en cirkostancoj malfavoraj, ĉar ĉiutage surprizadis nin abunda pluvo, tamen la ĝenerala lingva nivelo estis sufiĉe alta.

El D kurso rezultis fine 8 novaj geinstruistoj, kiuj sukcese plenumis kondiĉojn de la ekzamenoj: Anna Veselá, Marta Lorková, Andreo Valjan, Vladimír Novotný, Věra Kořínková, Věra Podhradská, Jaroslava Novotná kaj Ladislav Adámek. Nia Junularo ricevis do du novajn geinstruistojn, Anna Veselá kaj Vlad. Novotný, ambaŭ sukcesis eminente! Ni varme premas iliajn manojn kaj deziras al ili sur pedagogia kampo riĉan rikolton!

Van.

- -

GRAVA SCIIGO: depost septembro nia Junularo regule kunvenadas en nova klubejo: Praha II – Krakovská 21, III. etaĝo – ĉiumarde 19 – 21a horo!

---

La REVUO ORIENTA, organo de Japana Esperanto Institute en sia 5a numero portas japanlingvan artikoleton, el kiu ni sciiĝas, ke s-ano Pavlacký en Veselí nad Moravou kolektas diversajn semojn /kafarbojn el Meksikio, el Kongo, amarilisojn el Afriko, semojn de herboj el Japanio kaj Brazilo ktp./.

-

ESPERANTO CITATA EN ĈEĤA BIBLIOGRAFIA VERKO. En la serio de ĉeĥlingvaj BIBLIOGRAFIAJ BROŜUROJ aperis verko de Julius Dolanský „Náš Zdeněk Nejedlý". La verko enhavas kompletan elĉerpon de la verkoj de nomita verkisto-historiisto. Inter liaj verkoj, kiuj estis tradukitaj kaj aperis ankaŭ en fremdaj lingvoj estas jena citaĵo: „Lerneja reformo en Ĉeĥoslovakio. Do esperanta přeložil Jaroslav Mařík, Praha. – Instituto de Esperanto Servo 1949, 55 stran." /En esperanton tradukis J. Mařík, Praha, eldonis IES 1949./

-

**Praha-ek-1955-29-04**



EN AFERO DE „HEROLDO“ oni korespondas kun ni iam tro abrupte. Ni ja ne postulas petojn nek dankojn, sed tuŝas nin neagrable, se alvenas seka letero sen alparolo kaj sen saluto. Ni ja volonte plenumas la postulatan servon laŭ nia ebleco, ni volas tamen diri, ke ni ne estas administracio, sed grupo de memvolaj laborantoj, kiuj zorgas, ke disiru tiu revuo laŭorde en nia lando. Ĝentila alparolo igas tiun taskon pli facila por ni.

- -

EMINENTULOJ PRI ESPERANTO. Se ĉiu korm sia gepatra lingvo lernus ankoraŭ la helplingvon Esperanto, faciliĝus pluraj aferoj, kiuj estas hodiaŭ ĉiam ankoraŭ tiel malfacilaj, kiel interrilato inter popoloj, interŝanĝo de ideoj sur kampo scienca kaj literatura ĝenerale, disvastigo de vero, refuto de mensogoj kaj antaŭjuĝoj, reciproka interkomatiĝo kaj interkompreno, pacaj celadoj kaj fratiĝo de popoloj en krsitana amo. Mallonge dirite, oni povus tiel fari multon bonan por tuta homaro kaj oni ŝparus tempon kaj monon. /Kontribuo de Dr Ant.Eltschkner, episkopo de Praha, al enketo de la gazeto „Moravská Orlice“ en Brno./

- -

En vigla kultura kunlaboroni estas kun Esperanto Asocio en Vietnamio. Sciigojn pri tio alportos nia venonta numero de Bulteno!

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Grandaj kaj malproksimaj estis tiuj perspektivoj, kiujn havis la „Verda ĉaro de Julio Baghy“ antaŭ si ĉe sia estiĝo: helpe de Esperanto disvatigi kulturon de la nacioj trans la limoj de nia patrujo. Bedaŭrinde la cirkonstancoj ĝis nun ne permesas tion, sed ĉar la monto ne povis iri al Mohamedo, devis Mohamedo veni al la monto. La 13an de Julio 1955 en Otrokovice ricevis V. Ĉ. sian unuan internacian bapton. Pluraj esperantistoj el fremlando alveturis por ĉeesti la tutŝtatan konferencon de esperantistaj pacdefendantoj kaj tiuj kune kun la delegitoj ĉeestis la artan vesperon de V. Ĉ., dum kiu estis-krom kelkaj tradukitaj poemoj kaj teatraj monologoj de niaj aŭtoroj-prezentitaj du teatraĵetoj de Antoni Seemann „Korespondu“ kaj „Mi esperas“. La plej granda parto de niaj samideanoj konas jam la laboron de V. Ĉ. - despli scivolaj ni estis ekscii la opinion de la eksterlandaj samideanoj. Kaj ĝi estis por niaj artistoj pli ol tre bona. Kelkaj el la delegitoj estis jam spertaj, multe vojaĝintaj samideanoj, kaj ĉiuj egale asertis, ke per tiu ĉi speco de kultura laboro povas fieri nur la ĉeĥa esperantista movado – nenie ili ĝis nun vidis ion similan. Jen prijuĝo, kiu ĝojigas-kaj ankaŭ devigas al plua laboro.

Alia loko, kie V. Ĉ. prezentis sin, estis la tradicia Somera kolegio de Esperanto en Doksy, kie krom du-plejparte ĉeĥaj-artaj vesperoj estis denove prezentitaj ambaŭ teatraĵoj de A. Seemann. Kvankam tiun ĉi prezentaĵon antaŭiris komedio plena de eraroj, tamen la nivelo de la prezentaĵo estis tre bona kaj V. Ĉ. akiris inter la kursanoj multajn admirantojn kaj eĉ kelkajn pliajn anojn.

La somera sezono finiĝas kaj antaŭ la anaro de V. Ĉ. Ekestas grava tasko: prepari artan programon por la vintro. Ellabori dramaturgan planon por

tiu ĉi kolektivo estas neniel facile – esperantaj teatraĵoj ĉu originalaj ĉu tradukitaj ne estas tro multaj – kaj tiuj, kiuj ekzistas, ne estas taŭgaj pro la granda nombro da supozataj geaktoroj. Restis do nenio alia ol helpi al si mem – la anoj de V. Ĉ. devas ja koni ĉion de la tirado de kurteno ĝis verkado de teatraĵoj. Tial estis pretigita por la vintra sezono muntaĵo el „La hejmo“ de Sudermann /en reverko de Antoni Seemann/, la ŝerca unuakta teatraĵo de Ĉeĥov „La urso“ /en traduko de Eva Suchardová/. Tiu ĉi elekto estas bazo por eventuala eblo ekskursi fremdlanden.

: : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : :

Nia membro Sláva H e ř m a n , faka asistanto de slavaj lingvoj ĉe filologia fakultato de la universitato en Praha forlasis la ĉefurbon por deĵori kiel asistanto de la ĉeĥa lingvo ĉe la universitato en Pekino. La nia amiko ni bondeziras sukcesplenan laboron kaj al ĉinaj samideanoj ni sendas pere de li elkorajn salutojn. Certe baldaŭ atingos nin la unua raporto de nia membro.

- -

LA UNUA ATOMA ELEKTREJO estas instrua 8-paĝa broŝureto 15x21 sm, verkita de dro Rudolf Pawlik kaj eldonita en Trenčín. Ĝi parola sen klara, por ĉiu komprenebla lingvo pri la interesaj sovetuniaj eksperimentoj utilit atoman energion por pacaj celoj. Ni rekomendas ĝin varme pro ĝia ohavo kaj ankaŭ pro ĝia lingva flanko. Prezo de la pure faita multobligaĵo Kčs 2,20. Mendu ĉe Ján Lamačka, Pod Sokolicami 1675, Trenčín.

- -

EKIK – datreveno. La 11-an de novembro 1953 estis fondita EKIK-Esperantaĵojn kolektanta Internacia Klubo-kies sidejo estas nun en Waterman, Pa, Usono. Por honormemorigi la unuan datrevenon de EKIK-fondo estis eldonitaj pere de la membroj-kolektantoj du jubileaj glumark-folietoj: la unua en Barcelono, la dua en nia lando. La foliem konsistas el kvar diversaj glumarkoj kun datoj kaj simbolaj emblemoj. La ĉeĥan folieton projektis nia membro s. Dolfa Bartošík. Interesiĝantoj pri EKIK kaj la glm turnu sin al s. Bartošík pere de nia Bulteno. FABA

- -

Ni envias LA JAPANOJN. En maja nro de La Revuo Orienta ni legas sub titolo „Niaj membroj alilanden!“ informon pri jenaj vojaĝoj de japanaj samideanoj: 1/ La UK en Bologna partoprenos prof. Kawahara, rektoro de la Jura Fakultato de Tyuo Universitato, dr Shinoda, vicprezidanto de la Shinoda Hospitalo kaj konata ginekologo, Uaseda, grandkomercisto el Nagoya. 2/ Laŭ invito de la Soveta Scienca Akademio vizitos Sovetion 15 plej elstaraj sciencistoj japanaj, inter ili malnova samideano

prof. Egami. 3/ La Azian Packonferencon en New Delhi partoprenis kiel reprezentanto de japanaj industriistoj s. B. Matuoka, prezidanto de la Matuoka Industria Kompanio. 4/ Universitato en Kioto sendis en majo esploran ekspedicion en la montaro Karakorum. Unu el ĝiaj membroj estas esperantisto prof. T. Umesao de la Universitato en Osaka. Kaj 5/ Kemia industriisto S. Sumia el Osaka vizitos diversajn eŭropajn landojn. Ni sincere gratulas niajn japanajn amikojn, sed ankaŭ iom envias ilin pro la eblecoj, kiuj ĝis nun ne ekzistas en nia lando.

- -

SLOVAKA GAZETO PRI ESPERANTO. Ĵurnalo de slovakaj sindikatoj Práca en Bratislava raportas la 28-an de junio sub titolo „Interes opor Esperanto“ pri la letero, kiun direktiv s. Bokarev de la Lingvoscienca Instituto en Moskava al la Bulgara Esperanto-Kooperativo en Sofia.

- -

ARĜENTAN GEEDZIĜAN JUBILEON festos geedzoj Ant. kaj A. JANDÍK en Prostějov, Palackého 13a. Al la jubilantoj ni sendas niajn plej sincerajn bondezirojn.

EK PRAHA

- -

**Praha-ek-1955-29-06**



VERDA VOĈO DE DOKSY

---

S e p t e m b r o 1 9 5 5.

D o k s y n u n j a r e j u b i l e i s.

En la dua duono de julio por la d e k a fojo venis pli sperte esperantistoj kaj novaj adeptoj por partopreni la kolegian instruadon ĉiu laŭ la respektive karaktero de siaj scioj. Pli ol 80 frekventantoj lernis en tri klasoj. De la komenca interkona vespero ĝis la lastaj horoj regis bona disciplino kaj bona volo akiri laŭeble plej abundajn sciojn. Antaŭtagmeze de la oka ĝis la dekdua horo regula instruado, posttagmeze kutime laŭ la vetero ripozo ĉe la lago kun diversaj distroj kaj vespere kulturaj aŭ amuzaj programoj certe donis multon al ni ĉiuj. Speciale la vespero de Verda Ĉaro de J. Baghy restas neforgesebla travivaĵo. Ni vidis labori nian Majstron kaj vivi lin meze de sia familio, ni vidis Grabowski kaj tion oni ne povas forgesi.

Ĉiuj instruistoj Ginz, Píč, Dr Pumpr, Dr Seppová, Slanina, Suchardová, Špůr, Vítek donis al ni multon kaj havis la plej bonan volon. Antaŭtagmeza instrutempo ofte ne sufiĉis kaj ni kolektiĝis plurfoje en la lernejo por partopreni oratoran kurson de s. Slanina aŭ por solvi aliajn lingvajn aŭ ceterajn problemojn. Unu posttagmezon komuna brigado de 44 kolegianoj faris grandan purigan laboron en ĝardenoj de loka urba entrepreno. Dank´ al tiu ĉi brigado ni ĉiuj ĝuis belegan posttagmezan boatkrozadon sur la lago de Mácha kun vizito de Staré Splavy. Alia brigado 14 membra helpis al la aranĝantoj dum la prezentado de opero „Najado“ en natura teatro ĉe la lago. Belaj kaj certe tre interesaj estis ambaŭ aŭtobusaj ekskursoj: al Nový Bor /lokaj vitrejoj/, rabista kastelo kaj banko Sloup, kiun gvidis s. R. Wenzel kaj al Valečov kaj etaj graotoj de Drábsko sub gvido de s. F. Pytloun.

La kolegio havas du menciindajn aranĝojn: Verda vendejo /s. Pytloun/ ĉiutage zorgis ne nur pri niaj esperantaj animoj, sed ankaŭ pri niaj stomakoj. Bonkvalitaj matenmanĝon agrable komencigis ĉiutage nian laboron. Kaj la infanvartejo /s-ino L. Rejthárková/ certe estis granda helpo la la patrinoj, kiuj volis studi, sed saman volon ne havis iliaj etaj infanoj. Ankaŭ tiu ĉi aranĝo montris sian gravan taskon kaj dum la sekvantaj jaroj ĝi servos denove por senzorgigi la lernemajn gepatrojn kaj doni al la infanoj utilan kaj agrablan kupon en la naturo.

Kvankam s. Špůr plene zorgis pri nia ĉiuflanka kontenteco, estis diversaj malhelpoj, kiuj superis liajn fortojn. Estis ekz. la demando de malkara sed fortna manĝo. Lokaj restoracioj ne ofte zorgis pri ni, speciale ne dimanĉe. Kontraŭe ni ĝenerale loĝis vere bone.

Kortuŝa estis zorgo de 73jara Dro J. Fousek el Přelouč, kiu celis kontribuci al la programoj per programeroj de kolegia ĥoro. Lia laboro estis certe bonega kaj meritplena. Restas ankoraŭ mencii, ke agrabla por ni estis la vizito de gesamideanoj el la regiono Olomouc. Nur, bedaŭrinde, tre mallonga estis lia vizito.

**Praha-ek-1955-29-07**



La 14-tagoj – tagoj tre belaj kaj agrablaj – pli rapide pasis ol ni volis. Lastan sabaton valorigis nian komunan laboron pedagogia gvidanto s. J. Vítek kaj adiaŭajn vortojn diris instruistojn kaj frekventantojn. Larmoj en okuloj de multaj kaj malgajaj vizaĝoj de la ceteraj esprimis saman ideon: unu jaro de efika peresperanta porpaca laboro rapide pasos kaj denove – ĝis la revido en Doksy 1956!

Partopreninto.

- - -

D O K S A Ŝ I P O

Doskaŝipo naĝas jam jardekon.
Sperto edifanta laŭdu kapitanojn,
kiuj estris jarojn kaj ferdekon.
Laŭdu pro la sam lernejanojn.

Kvankam oni ĉiam tre laboris,
eĉ se dum la tagoj sunaj, noktoj lunaj,
rozoj kaj tilioj bonodoris,
tamen ĉiuj anoj restis junaj.

Poděbrady 22. 7. 1955 Stan. Kamarýt

- -

: : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : : :

CELO DE NIA BULTENO. Al amikoj, kiuj ne komprenas nian situacion, ni sciigas, ke ni estas plene konsciaj pri nesufiĉo de tiu ĉi Bulteno kaj pri ĝiaj gravaj mankoj. Neniel nin kontentigas ĝia aspekto kaj ofte ni ne estas kontentaj pri ĝia ohavo. Pri la aspekto kulpas la cirkonstancoj, ĉar ne estas en nia lando nun eble presi ion en Esperanto. Ni devas danke akcepti ĉi tiun multobligaĵon, preparata de oficiala Kultura Societo /Osvětová beseda/, kies parto ni estas. La enhavo iam estas diktata ankaŭ de cirkonstancoj. Diversaj kontribuaĵoj ne respondas plene la intencon de la redaktantoj, iuj aperas tie lastmomente sen necesa kontrolo, ĉar ĉiuj kunlaborantoj estas ĝis ekstrema limo okupitaj en siaj profesioj. Ni celas per nia Bulteno informi niajn membrán pri tutmonda marŝo de Esperanto kaj pri esperantistaj novaĵoj en nia lando. Stari kun ni en unu vico, ne laciĝi kaj helpi al ni teni la verdan standardon, por la tutmonda paca kunvivo estas nia celo. Ni ekspedas la Bultenon ankaŭ al proksimume 100 gravaj adresoj en eksterlando, dezirante pruvi al la cetera mondo, ke ni daŭre ekzistas kaj laboras laŭ niaj malgrandaj eblecoj.

- -

IEMW – Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno I Hofburg, Aŭstrio estas la sola, tiaspeca instituto en la mondo. Ĝiaj kolektoj plenigas 5 salonegojn en iama imperiestra kastelo en Vieno. Por kontrakto kun ministerio por instruaferoj el jaro 1928, la ŝtato por eternaj tempoj zorgos pri la konservado, donos senpagan baron, bindigas librou ktp, ĉar IEMW kolektas ĉiujn presaĵojn pri Esperanto aŭ pri iu ajn mondlingva sistemo, esperantajn librou, broŝurojn, faldprospektojn, afiŝojn, kongresaĵojn, fotojn de eminentuloj el la movada kaj de esperantaj kunvenoj, korespondaĵojn de eminentuloj de pli frua tempo kt. – Fine de 1955 IEMW eldonos katalogon pri siaj kolektoj, inter kiuj troviĝas proksimume 10 000 libroj. Interesa Informilo de IEMW aperas 4foje dum la jaro. La fondinto kaj direktorko de IEMW estas kortega konstanto Hugo Steiner.

- -

-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-.-

Laŭbezone eldonas Esperantista klubo ĉe Osvětová beseda en Praha 2.

Koresponda adreso: Jaroslav   Ŝ u s t r, Dlouhá tř. 10, Praha I.

**Praha-ek-1955-29-08**



TUTŜTATA KONSULTA KOMITATO ESPERANTISTA

I-a Tutŝtata konferenco de Esperantistoj-Padefendantoj en Ĉ S R.

En la tagoj de 7a-10a de julio 1955 okazis en urbo Otrokovice I-a Tutŝtata konferenco de Esperantistoj-Pacdefendantoj en Ĉeĥoslovakio. Partoprenis ĝin entute 316 delegitoj el 90 lokoj el ĉiuj partoj de la ŝtato kaj 9 eksterlandaj gastoj /el Aŭstrio, Danio, Francio, Svedio kaj Usono/. La konferenco estis ekkomencita ĵaŭde la 7. 7. 1955 per prelego de s-ano Rudolf Burda, prezidanto de MEM /Mondpaca Esperanto-Movado/ je la temo „Kiajn taskojn havas Esperanto en la tutmonda movado de Pacdefendantoj“. Post ĝi estis solene malfermita ekspozicio „Popoloj de ĉiuj landoj en batalo por konservi la pacon“, enhavanta tre riĉan materialon pri paca laboro de esperantistoj ĉeĥoslovakaj kaj eksterlandaj. Vespere estis aranĝita por la gekonferencanoj interkona amuzado. Vendrede la 8.7. antaŭtagmeze estis dediĉita al du prelegoj: unu pri la atombombo en Hiroŝimo /prelegis s-ano prof. Kožený/, dua pri spertoj de ĉeĥa laborista mondvojaĝanto s-ano Pech je la temo „Per Esperanto tra la mondo“. Posttagmeze kunvenis ĉeestantaj gvidantoj de Esp. rondetoj por pritrakti diversajn organizajn problemojn. Vespere en granda salono de uzinklubo prelegis s-ano Josef Vítek el Praha je la temo „Nordaj landoj“. La prelego akompanata per koloraj filmoj estis publika kaj ekvekis inter loka loĝantaro viglan intereson pri Esperanto. Sabate la 9.7. antaŭtagmeze ĉeestis prelegojn pri „Marksismo en lingvistiko“ /s-ano prof. Kožený/ kaj pri UNESCO /s-ano Miloš Rudolf/ tre multaj aŭskultantoj. Posttagmeze prelegis kvar literaturaj fakuloj /s-anoj Ginz, Kořínek, Omelka kaj Urban/ pri Esperanto en literaturo. Je la 16-a horo kunvenis delegitoj de Junulargrupoj en speciala kunsido por pritrakti aferojn de Junular-movado en ĈSR. Vespere estis prezentita altvalora arta programo, kiun preparis artisma grupo „Verda Ĉaro de Julio Baghy“ el Praha.
Dimanĉe la 10.7. matene en loka preĝejo celebris por interesuloj katolikan meson s-ano P. Macek, kanoniko el Mikulov. Je la 9a horo estis malfermita ĉefa laborkunsido de la konferenco. Ĉefreferatojn prelegis s-ano Rudolf Burda je la temo „Esperantista pacmovado“ kaj s-ano Josef Vítek je la temo „Esperanto-interkomprenilo de nacioj“. Poste alparolis la ĉeestantojn reprezentanto de uzinklubo de nacia entrepreno Svit, en kies kadro Esperanto-rondeto en Otrokovice laboras, reprezentantoj de loka publika vivo kaj eksterlandaj gastoj. Estis ankaŭ tralegitaj alvenintaj salutleteroj, inter kiuj speciale grandan intereson ekvakis tiu de s-ano Bokarev el Moskvo. Posttagmeze parolis reprezentanto de slovakaj Esperantistoj Dro L. Izák kaj plua tempo estis dediĉita al diskutado. Post ĝia finiĝo estis prezentita kiel plej grava punkto de la programo pritrakti aferon de Tutŝtata Konsulta Komitato Esperantista en ĈSR, kiu en provizora formo estis kreita en januaro 1955 dum laborkonferenco de Esp.rondetoj el regionoj Ostrava kaj Olomouc kaj kies cele estas kunordigi la agadon de ĉiuj Esperanto-rondetoj en la ŝtato kaj helpi diversrimede al tiuj, kiuj ne havas ankoraŭ sufiĉe da spertoj aŭ kiuj nur la laboron ekkomencas. La kreo de TKKE estis unuanime aprobita kaj en voĉdonado pri ĝia estraro estis kiel prezidanto elektita s-ano Josef Vítek el Praha, kiel sekretario s-ano Miloš Rudolf el Olomouc. Estis interkonsentite krei tri ĉefajn sekciojn: porpacan, organizan kaj lingvan. Kiel gvidanto de la sekcio por pacmovado estis elektita s-ano Rudolf Burda el Plzeň, gvidanto pro organizaj aferoj s-ano Josef Kožený el Kutná Hora, gvidanto por lingvaj aferoj s-ano Tomáš Pumpr el Praha. Estis aprobita ankaŭ propono, ke oficiala organo de TKKE estu bulteno „Nia Spegulo“, redaktata de s-ano Ján Lamačka el Trenčín.

Dro Vladimír Mohapl

**Praha-ek-1955-29-09**



ORGANIZA STRUKTURO DE TKKE:

prezidanto: Josef Vítek, Praha II., Jungmannova 24, telefono 23 83 23
sekretario: Miloš Rudolf, Wanklova 14, Olomouc
kasisto: Karel Fabián, Komenského 22, Olomouc
Junularo: Jaroslav Mařík, Malá Štěpánská 9, Praha II.
Preso: Ján Lamačka, Pod Sokolicami 1675, Trenčín
Dro Vladimír Mohapl, Olomouc.
porpaca sekcio: Rudolf Burda, Packého nám. 6, Plzeň
František Lička, Březí 12, Ostrava-Zábřeh
M. Evjáková, Otrokovice, záv.klub ROH Svit, kroužek Esperanta
organiza sekcio: Josef Kožený, profesoro Kutná Hora
Václav Špůr, Doksy, Moskevská 354, Doksy u Máchova jezera
Jaroslav Šustr, Dlouhá 10, Praha I.
Fan Matušová, Krátká 812, Otrokovice
lingva sekcio: Dro Tomáš Pumpr, Thälmannova 8, Praha-Bubeneč
Dro Stanislav Kamarýt, Chotěboř
Jiří Kořínek, Merhautova 159, Brno 14
Josef Vondroušek, Botanická 31, Brno
Theodor Kilián, Příční 318, Třebíč
slovaka sekcio: vicprezidanto Eduard V. Tvarožek, Hviezdoslavova 3, Maritn
lingvo & literaturo: Ján Valašťan Dolinský, Hliník 108, okr. Pezinok
kontakto kun SOR kaj
centraj oficoj: Pavol Rosa, Vlčkova 46, Bratislava
instruado, kursoj, lernolibroj, kluba vivo: Dro Magda Seppová, Vlčkova 53, Bratislava
Junularo: Milan Zvara, Mýtna 45, Bratislava

\- - - - - -

TUTMONDA FESTIVALO DE JUNULARO EN VARSOVIO – NIA GRANDA SUKCESO.
Dum la festivalo efektiviĝis kunvenoj de esperantista junularo. Partoprenis pli ol 120 junaj esperantisto el 15 landoj. Monda federacio de demokr. junularo rekonas gravecon de Esperanto kaj promesas ĝian argon. Esp. junularo vizitis la tombon de L. L. Zamenhof. Nian ŝtaton reprezentis Dro Jaromír Jermář, membro de EK Praha.

\- -

REGIONA KONFERENCO EN SVIT okazis la 17an de aŭgusto. Raporton pri ĝi havos venonta numero de Nia Spegulo. Sukcesa konferenco. Novaj kursoj en Svit kaj Poprad, kie fondita nova rondeto ĉe Dom osvety.

\- -

TEATRO POPULAR DO BRASIL. La 26an de aŭgusto 1955 havis en Martin prezentadon la brazila negra teatro- kaj dancgrupo Teatro Popular do Brasil. La libroeldonejo OSVETA donacis al la grupo 4 grandformatajn bildlibrojn pri belaĵojn de Slovakio kiel rememoraĵon pri ilia restado en Martin. La dedka teksto en la libroj estis skripta en lingvoj slovaka kaj Esperanto.

\- -

ESPERANTO PROGRESAS EN POLUJO. Ni ricevis informon de Asocio de Esperantisto jen Pollando, laŭ kiu ricevis tiu ĉi organizo de la pola registaro novan belan oficejon. Ni provizore ne ĝuas ankoraŭ tiun ĉi simpation flanke de la decidantaj aŭtoritatoj, sed sendube tiu tempo venos.

\- -

SOVETUNIA ESPERANTO-ASOCIO estis fondita en Moskvo kiel parto de la Scienca Akademio. En diversaj urboj de Sovetunio estos filioj de tiu Asocio. En Scienca Akademio renkontis nia lingvo plurajn influajn amikojn. En nia lando devas iri la evoluo certe en sama direkto.

\- -

UNUIĜINTAJ NACIOJ HAVAS SIAN ESPERANTO-OFICISTON. S-no M. Campan, esp. oficisto en UNO-palaco en Novjorko sendis al ni du salutojn kaj promesas helpon. Unu saluto venis el Novjorko kaj la dua el la konferenco por paca utiligo de atoma energio en Ĝenevo-ambaŭ al la sekretario de TKKE.

\- -

**Praha-ek-1955-29-10**



REZOLUCIO DE LA JUBILEA 40-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO.

La 40-a Universala Kongreso de Esperanto, okazanta en Bologna de la 30-a de Julio ĝis la 7-a de Aŭgusto 1955, en peso de 1700 reprezentantoj el 36 landoj, unuanime:
1/ kun ĝojo konstatas, ke la Ĝeneva Konferenco de la kvaj ĉefoj de Registaroj iniciativ malstreĉigon de la internacia tensio kaj esperas ke tiu komenco estos sekvata de pozitivaj rezultuj precipe sur la kampo de pli bona kompreniĝo kaj proksimiĝo inter la larĝaj popoltavoloj de ĉiuj nacioj de la mondo;
2/ esprimas sian kontenton pro la Rezolucio de la 10-a de Decembro 1954, per kiu la Ĝenerala Konferenco de U.N.E.S.C.O. objektive rekonis, ke la Internacia Lingvo Esperanto kontribuis al internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj la monda paco, kaj ke ĝiaj atingaĵoj respondas al celoj kaj idealoj de U.N.E.S.C.O.;
3/ atentigas, ke ĉiu sincera klopodo prosimigi la popolojn, krei spiriton de reciproka toleremo kaj formi veran internacian solidarecon ne povas neglekti tian potencan instrumenton de internacia komunikado kia estas la Internacia Lingvo Esperanto kaj tial
a/ apelacias al naciaj kompetentaj instancoj donis sian argon al disvastigo de Esperanto, tute speciale per helpo al starigo aŭ restarigo de la Esperanto-organizaĵoj en tiuj landoj, kie tiaj pro diversaj kaŭzoj nuntempe ne ekzistas;
b/ petas la Registarojn de ĉiuj ŝtatoj profunde studi la eblecojn enkonduki Esperanton en la lernejojn prefere surbaze de Internacia Konvencio, kiu fiksos la detalojn rilate la studon en diversaj landoj samtempe;
c/ notas kun aprobo, ke la urbestraoj de Bologna kaj Boulogne-sur-Mer dum la Kongreso solene ĝemeligis siajn urbojn per Esperanto kaj esperas, ke multaj aliaj urboj sekvos tiun ĉi ekzemplon;
d/ turnas sin al ĉiuj, kiuj aspiras pli grandan unuecon de la mondo kun la alvoko ellerni la Internacian Lingvon kaj vaste praktiki ĝin en la internaciaj rilatoj.

- - - - -

AL UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO ALIĜIS 5 NOVAJ LANDAJ ASOCIOJ:
la pola, la germana, la finna, la bosnia-hercegovina kaj la dua asocio el Usono.
NOVA ESTRARO DE UEA. Prezidanto: Malmgren /Svedio/, vicprezidanto: Kennedy /Britio/, ĝenerala sekretario Dro Ivo Lapenna, estraranoj: Mabesoone /Nederlando/ kaj Llech-Walter /Francio/.

- - -

BULGARAJ ESPERANTISTOJ dissendas en la mondon la unuan nron de la Bulteno de la Bulgara Esperantista Asocio kaj de la Bulgara Esperanto-Kooperativo. Ĝi estas nur multobligita kaj modesta, sed ĉiu ĝia linio elradias entuziasmon. La eldono okazas danke al permeso, kiun donis la registaro sen speciala peto flanke de esperantistoj. Aperis en ĝi alvoko, laŭ kiu ŝtata Arkivo Bulgara sin turnas al bulgaraj esperantistoj kun peto, ke ili liveru materialon pri sia partopreno en la rezista movado.

- - -

GRAVA ATENTIGO! Ĉiujn aperigotajn novaĵojn el nia movado regule sendu al s-ano Ján Lamačka, redaktoro d la organo de TKKE Nia Spegulo, Trenčín, Pod Sokolicami 1675 kaj al nia sekretario s-ano Miloš Rudolf, Wanklova 14, Olomouc.

-.-.-.-.-.-.-

LASTMOMENTA SCIIGO: lasta numero de Heroldo de Esperanto ankoraŭ ne atingis la distribuantojn en Praha, tial ne korespondu en tiu ĉi afero.

-.-.-.-.-.-.

TELEGRAMO: HEROLDO jam en Praha, jam distribuata.

EKP.